WIKIPEDIA

Ripuara dialektaro

La **ripuara dialektaro** estas grupo de dialektoj de la germana lingvo kaj samkiel la norma germana lingvo apartenas al la okcidentĝermana lingvaro.

En sama serio de germana eldonejo inter alie aperis multvendataj lingvogvidiloj kaj pri Esperanto kaj pri la kolonja dialekto ("Kölsch") de la ripuara dialektaro

Ĝi parolatas en okcidenta Germanio kaj en la germanlingva parto de Belgio, pli konkrete en sudokcidenta Nordrejn-Vestfalio (inter alie en la urboj Kolonjo kaj Bonno), krome ĉe la nordokcidenta rando de Rejnlando-Palatinato, en la norda duono de orienta Belgio, kaj en la plej suda parteto de Nederlando (ĉirkaŭ la urbo Mastriĥto, kie ankaŭ parolatas la limburga).

Disvastiĝo

La dialektaro parolatas en vasta areo inter la urbo Duseldorfo norde kaj Bad Neuenahr-Ahrweiler sude, inter Eupen en Belgio okcidente kaj Siegen oriente. La teritorio esence estas la regiono, kiu historie dum multaj jarcentoj konsistigis la eklezian princlandon "Kurfürstentum Köln".

La ripuara norda parto de la germanlingva parto de Belgio nur post la jaro 1918 iĝis parto de Belgio kaj antaŭe same estis kolonja. Krome la ripuara parolatas en iuj limaj komunumoj de la provinco Limburg de Nederlando, nome en la urboj Kerkrade - la loko de la

Ripuara dialektaro

mapo kie la ripuara (blue) vaste parolatas (verde: apenaŭ loĝata arbaro)

Parolata en	Germanio (Nordrejn-Vestfalio, Rejnlando-Palatinato) Belgio (Nederlando)
Parolantoj	250 000
Skribo	latina

Lingvistika klasifiko

hindeŭropa lingvaro
ĝermanaj lingvoj
okcidentĝermanaj lingvoj
altgermana
mezgermana dialektaro
mezfranka dialektaro
ripuara dialektaro

Reguligita de	
Lingva statuso	2 vundebla

Lingvaj kodoj

Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	-
ISO 639-3	ksh
SIL	-
Glottolog	ripu1236
Angla nomo	Ripuarian

IJK de somero 1989, Simpelveld, Vaals kaj la ĉirkaŭaĵo.

Franca nomo francique ripuaire

La plej konataj variaĵoj de la ripuara dialektaro estas la urbaj dialektoj "Kölsch" de Kolonjo kaj "Bönnsch" de Bonno, ĉe la rivero Rejno en la centra parto de la dialektejo, kaj "Öcher Platt" (Akeno), "Dürener Platt" (Düren) kaj "Eischwiele Platt" (Eschweiler) en la okcidento.

specife formita glaso de la loka biero "Bönnsch", samnoma kiel la loka ripuara dialekto de Bonno

"Kölsch" kaj "Bönnsch" krom dialektoj ankaŭ estas lokaj specoj de biero, kaj ĉar la parolantoj de la ripuara konsideriĝas esti aparte festemaj, la dialektaro nelaste praktikiĝas en bierejoj.

Ekzistas propra vikipedia branĉo en la ripuara dialektaro.

Eksteraj ligiloj

- ripuara vortaro (http://germazope.uni-trier.de/Projects/WBB/woerterbuecher/rhwb/wbwelcome)
- ripuara vortaro: aldona volumo (http://germazope.uni-trier.de/Projects/WBB/woerterbuecher/rhnwb/wbwelcome)
- Eischwiele Platt - vortaro de la ripuara dialekto de la urbo Eschweiler (http://www.eischwieleplatt.de/)
- "Akademie för uns kölsche Sproch" - Akademio por nia kolonja lingvo (http://www.koelsch-akademie.de/)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Ripuara_dialektaro&oldid=6023170"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 10:10, 16 sep. 2016.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.